

Wilhelm Müller,

Ĉe put' antaŭ pordego

tradukita de Joachim Gießner

Ĉe put' antaŭ pordego
 jen staras la tili'.
 En ĝia ombro dolĉe
 ja ofte revis mi.
 Mi tranĉis karajn vortojn
 en ĝia kruda ŝel'.
 En ĝojo kaj doloro
 ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri
 dum nokta obskurec'.
 Mi fermis la okulojn
 en nigra malhelec'.
 Kaj kvazaŭ min vokante
 la branĉoj muĝas jen:
 "Ĉi tien vi nur venu
 kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis
 dolore kontraŭ mi.
 De l' kap' ĉapel' forflugis,
 ne turnis mi al ĝi.
 Nun malproksima estas
 mi for de la tili',
 sed vokas ĝi: "Nur venu,
 trankvilon trovos vi!"

...

Wilhelm Müller,

Der Lindenbaum

Am Brunnen vor dem Tore
 Da steht ein Lindenbaum
 Ich träumt in seinem Schatten
 So manchen süßen Traum
 Ich schnitt in seine Rinde
 so manches liebes Wort
 Es zog in Freud und Leide
 Zu ihm mich immer fort

Ich muß auch heute wandern
 Vorbei in tiefer Nacht
 Da hab ich noch im Dunkel
 Die Augen zugemacht
 Und seine Zweige rauschten
 Als riefen sie mir zu:
 "Komm her zu mir, Geselle
 Hier findest du deine Ruh."

Die kalten Winde bliesen
 Mir grad ins Angesicht
 Der Hut flog mir vom Kopfe
 Ich wendete mich nicht
 Nun bin ich manche Stunde
 Entfernt von diesem Ort
 Und immer hör ich's rauschen:
 "Du fändest Ruhe dort."

...

Wilhelm Müller,

Ĉe puto antaŭ l'urbo

tradukita de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj)

Ĉe puto antaŭ l' urbo
 jen staras la tili',
 en kies ombro dolĉe
 revadis ofte mi.
 Mi tranĉis en la ŝelon
 amsignojn pro memor';
 sopir' min tien logis
 en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis
 mi preter la tili',
 sed malgraŭ la malhelo
 okulojn fermis mi.
 Jen ĝiaj branĉoj muĝis
 kaj ŝajnis logi min:
 "Restadu, ho migrulo,
 ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,
 ĉapelon ŝiris for.
 Sed pelis min antaŭen
 turmentoj de la kor'.
 Se plue mi vagadus
 eĉ ĝis la monda fin',
 la branĉoj ĉiam logus:
 "Ni trankviligos vin!"

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.*

Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Mia kantarero I”, kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01), publikigita 1822.*

Arg-83-163 (2003-12-28 22:57:42)

Mi trovis tiun originan version en la TTT sub <http://ingeb.org/Lieder/AmBrunne.html>

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj).*

Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro “Post la kurso” de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: “Laŭ L. E. Meier k. a.”. El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la fratoj WINGEN mem.